

OMAĜO EN MOIA AL RAMON MOLERA KAJ PREZENTADO DE LA «MIRINDA LIBRO»

En Moia, la naskiĝurbo de nia neforgesebla forpasinta Ramón Molera Pedrals, okazis la 25-an de novembro omaĝo dediĉita al li, organizita de Barcelona Esperanto-Centro, Esperanto-Grupo Moia kaj la loka societo «Agrupación Cultural La Tosca».

La memorfesto malvolviĝis en la Kulturdomo de Moia. En la ĉefsalono pluraj afiŝoj sciigis pri la vivo kaj personeco de Molera ekde liaj unuaj kontaktoj kun Esperanto en 1937-a ĝis la dato de la forpaso en 1982-a.

Sur la podio, prezidis, la familio Molera kaj la urbestro de Moia, kiu per la lasta parolado fermis la omaĝfeston.

Unue parolis Salvador Aragay, kiu reliefigis la personecon de Molera kaj rakontis la okazaĵojn de la literatura konkurso pri la Esperanto-Delegito kaj pri la eldono de «La Mirinda Libro».

La folkloro Grupo L'Esbart de Moia kontribuis al la omaĝo ludante katalunajn tradiciajn dancojn gvidate de Arturó Castanys.

Infaninoj lernantaj Esperanton deklamis esperantlingve «La Vojo» de Zamenhof.

Sekvis la salutoj de Esperanto-Delegitoj kaj reprezentantoj de Esperanto-Grupoj.

Josep Solá Forcada, amiko kaj kunlaboranto de Molera ekde sia infaneco, en sia parolado rakontis travivaĵojn pri Molera, lia intereso pri Esperanto estante nur dektrijara kaj lia dumviva entuziasmo por la «interna ideo». Bonege, ke multiĝu homoj kiel li por idealo tiel granda.



Prezida tablo dum la omaĝo

La Preĝeja Ĥoro de Moia sub la direktado de Ignasi Albert kantis katalunajn kanzonojn.

Ana Maria Molera legis sian rakonton «Bona Homo» aperintan en «La Mirinda Libro» kaj sciigis ke ĝi estas vera propra travivaĵo.

Josep Montrás, la urbestro de Moia, danke bonvenigis en Esperanto kaj memorigis, ke per tiu elstara homo Moia transformiĝis en esperantistan urbon. Li donacis memorajon al la filino de Molera, Ana Maria, prezidantino de Esperanto-Grupo Moia.

Kiel finon de la omaĝo la Preĝeja Ĥoro kantis en Esperanto «La Espero» akompanate de la ĉeestantaj esperantistoj.

G. Moya